

Ernst Anschütz,

## Abio ho

*tradukita de Richard Schulz*

Abio, ho! Abio, ho!  
 Vi estas tre fidela.  
 Vi estas verda en somer',  
 En vintro kaj en primaver'.  
 Abio, ho! Abio, ho!  
 Vi arbo tre fidela.

Abio, ho! Abio, ho!  
 Vi multe al mi plachas!  
 Vi estas ja Kristnaska ghoj',  
 Vi arbo apud negha voj'!  
 Abio, ho! Abio, ho!  
 Vi multe al mi plachas!

Abio, ho! Abio, ho!  
 Min vi verdul' instruas:  
 Ke konstantec', ke la esper'  
 Konsolas nin en la mizer'.  
 Abio, ho! Abio, ho!  
 Min vi verdul' instruas.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-593-1193 (2013-02-26 15:10:12)*

*Tiu chi traduko aperis en 1982/12 en la n-ro 42 de la Vestfaliaj Flugfolioj eldonitaj de Rikardo Shulco (Richard Schulz). Tie estas indikitaj ankaŭ la muzik-notoj. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*